

La fundamenta rolo de la bildoj en la infanlibro

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-819/284, 1979 junio 21 kaj 23

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-41/SRI-1979-41-B-5-284-819-1979-06-21-23-Claude-kaj-Andree-Gacond-La-fundamenta-rolo-de-la-bildoj-en-la-infanlibro.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

La plenkreskuloj ofte rigardas envie al la montrofenestroj de la librovendejoj, kie viciĝas pli kaj pli allogaj infanlibroj. Se oni iom atente ekzamenas tiujn grafike belaspektajn albumojn, oni baldaŭ konstatas, ke ili personigas literaturan ĝenron plenkreskulan. Ni ne forgesu, ke ne la infanoj, sed la plenkreskuloj verkas kaj desegnas tiujn ĉi eldonaĵojn. Oni rimarkas, ke tiun ĉi ĝenron ekde la jaroj 50aj markis speco de eksplodo, en la senco, kiun oni donas al la esprimo "demografia eksplodo".

A.- Unu el la videblaj kaŭzoj de la infanlibra eksplodo, de la nuna dinamismo de la porinfana literaturo, estas tute certe la rapida kresko de la aĉetpovo de la plimulto de la sociaj klasoj. Hodiaŭ vastas la publiko, kiu havas alirejon al la kulturo, kiu ĝis antaŭ unu generacio estis klasa privilegio. En la plimulto de la familioj el ĉiuj sociaj tavoloj oni hodiaŭ kulture nutras la infanojn donacante al ili malavare librojn, kiuj estas posedindaj ne nur pro la literatura enhavo, sed ankaŭ pro la arta prezento.

Cl.- En la familioj freŝdate malfermiĝintaj al kulturaj aspiroj, la infanoj ĝenerale posedas pli da libroj ol la gepatroj. La librobretoj de tiuj infanoj estas fakte nekompareble pli riĉe provizitaj, ol ĝenerale estis tiuj de la socie privilegiitaj infanoj antaŭ unu generacio. En mia instruista funkcio mi havas la okazon viziti multajn hejmojn, kaj mi ĉiam iras viziti la ĉambron de miaj gelernantoj. Tiuj dekjaruloj estas posedantoj de veraj trezoroj literaturaj kaj artaj, kaj ili bone flegas ilin.

A.- La dinamismo de la porinfana literaturo kaj de ĝia ekstera manifestiĝo, la posedo de infanlibroj, estas unu el la plej videblaj atestaĵoj de la rimarkinda kultura revolucio, kiu markis nian epokon.

Cl.- Kiu ekde la infaneco vivis en kontakto kun grafike artaj kaj literature signifaj libroj, tiuj plenkreskule daŭre avidos je posedo de literaturajĵoj. Tion ĉi komprenis la eldonistoj. Tial ili komencis internaciskale organizi la porinfanan libromerkaton.

A.- Favoris tiun ĉi komercan agadon ne nur la ĝenerala riĉiĝo de la publiko, sed ankaŭ rimarkindaj bildreproduktaj progresoj. Grafike multiĝis la reprodukteblecoj je prezoj ĉiam pli malaltaj.

Cl.- Sed aliaj faktoroj favoris la infanlibran eksplodon. Multaj plenkreskuloj solvas la senton de kulpeco, kiun naskis ĉe ili la teknikaj kaj industriaj progresoj samtempe liberigaj kaj sklavigaj, rifuĝante en la protektitan mondon de la infaneco. Tial tiom da plenkreskuloj forlasas de tempo al tempo aŭ et sufiĉe ofte la tradiciajn literaturajn ĝenrojn, kiuj spegulas universon malkvietan kaj perforteman, por momente reinfaniĝi. En la infanliteraturo ili serĉas poeziplenajn verkojn, kie forestu la malcertecoj, la seksaj agresoj, la sociaj luktoj, la tro pezaj respondecoj, ktp.

A.- Tiun ĉi tendencon oni rimarkas en aliaj plenkreskulaj sintenoj: kiom da viroj forlasas la realecon sin dediĉante centprocente al ludado: fervojaj kaj aviadilaj ludiloj, fabrikado de reduktitaj modeloj, ktp. La infanliteraturo ne nur celas la infanaron, sed ankaŭ la plenkreskularon.

Cl.- Sed restas stranga sento rilate al la porinfana aŭ porjunulara literaturo. Intereso por ĝi fare de plenkreskulo estas sentata kiel regresa. Ĝenre ĝi estas iel konsiderata ĉu kiel folkloro avataro, ĉu kiel etiga adapto de universalaj verkoj.

A.- Ambigua estas niaj sentoj rilate al la infaneco. Unuflanke oni ĝin valorigas, sed aliflanke verkon porinfanan oni malestimas.

Cl.- Ĝis nun ĉefe la pedagogoj povis rilati al la porinfana literaturo sen travivi tiun ĉi ambiguecon ĵus priskribitan. Profesie ili devas interesiĝi pri la literaturo, kiun legas la gelernantoj. Ili ne iras al ĝi por trovi rifuĝejon, por serĉi eĥon al iama vivo patrine protektita, por revii momenton, sed por povi orienti kaj konsili infanojn kaj gejunulojn, por analizi, por kompreni. La pedagogoj legas infanlibrojn kiel literaturaj kritikistoj, ne kiel legantoj ordinaraj. Nenia malestimo al la porinfana literaturo troviĝas en tiu ĉi kritikisma sinteno, kiu baziĝas sur profunda kono de la infana spirito.

A.- Ni provos malkovri kelkajn aspektojn de la porinfana literaturo laŭ pedagoga aliro. Eble ni tiel helpos vin pli aprezi tiun ĉi ĝenron, kies ĉefa karakterizo estas uzo de du esprimrimedoj, la grafika kaj la skriba.

Cl.- Infanoj ne rilatas al la libro kiel la plenkreskuloj. Ili dialogas kun ĝi. Tial ili daŭre revenas al ĝi. Unue la bildojn ili rigardas, kaj la rakonton per tiuj ili divenas. La tekston ili deĉifros poste, kaj nur se la ilustraĵoj estis konvinkaj. Tial la grafika prezento de infanlibro tiom gravas.

A.- Post la deĉifrado, tio signifas post la iompostioma malkovro de la skriba rakonto, la infano revenas al la bildoj, kiun li pli profunde esploras. En ili li vere legas, kaj ĉefe tiu ĉi legado fiksiĝas en lia memoro.

Cl.- Por kompreni tiun ĉi leg- kaj memor-procezon, ni imagu situacion plenkreskulan, kiu havas analogecon. Kiam ni vojaĝas, ni ofte fotas. Poste ni povas revivi niajn feriajn travivaĵojn per lumbilda projekciado. Iom post iom de la koncerna vojaĝo ĉefe restas en nia memoro la eventoj spegulataj de la lumbildoj. La resto malaperas.

A.- Same estas por la infano. Rakonton li perceptas ĉefe tra la bilda priskribo. Kaj tiu ĉi komprenigas al li la legaĵon, kiun li mem faras aŭ kiun li aŭskultas. Poste la bildoj havas memorigan rolon.

Cl.- Tiurilate la ilustraĵoj de infanlibroj iel estas similaj al freskoj en mezepoka preĝejo. Ili havas helpan rolon por komprenigi la rakonton kaj memorigan rolon por permesi rerakonti la okazaĵojn. Kaj la rerakontoj pli kaj pli dependos de la riĉeco de la ilustraĵoj.

A.- Tio montras la fundamentan gravecon de la ilustraĵoj en la infanlibroj. La venontan semajnon ni vidos, kiel la disvolviĝo mem de la porinfana literaturo dependis de la talento de grafikistoj kaj de la bildreproduktaj progresoj.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond pri la porinfana literaturo. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), oktobro 2013*